nur virtuale [2]) (sed tamen vere). La Interpretacionistoj, al kiuj kaj Skolastikuloj *(Fröbes S.J., Mattiouci S.J.,* kaj aliaj) kaj ne-skolastikuloj *(Locke, Descartes)* apartenis, forĵetas la t.n. „vulgaran realismon", kiel eraran kaj naivan. Laŭ ilia aserto la perceptitaj ecoj de la fizikaj objektoj ekzistas virtuale objektive [3]) *ekster,* kaj formale subjektive [4]) *en* niaj organoj. La reala, fizika mondo laŭ ili estas konebla nur per scienca interpretado de nia perorgana kono, kaj konsistas nur el kernoj, elektronoj, atomoj kaj molekuloj, miksitaj kun ondoj kaj moviĝoj. Tiuj ĉi kaŭzas en niaj organoj subjektivan mondon de koloroj, gustoj, sonoj, k.t.p. La Integral-Realistoj rifuzas tiun ĉi „progresemulan" vidpunkton. Laŭ ilia „konservativula" rigardo la perceptitaj ecoj de la fizikaj objektoj ekzistas formale objektive ekster niaj organoj. Ĉio, kion ni vidas, aŭdas, aŭ alimaniere perceptas, vere havas kolorojn, aŭ sonas, k.t.p., eĉ se neniu homo iam estus en la mondo.

Evidentas, ke ambaŭ konceptoj portas en si ion allogan; precipe la Interpretacionismo reprezentas la modernan, junan ideon, kiu sin fiksas al la rezultoj de la nunaj pozitivaj sciencoj, sed kontraŭas la „ordinaran realismon". Tamen, ankaŭ la problemprezento ne samas por Integral-realistoj kaj Interpretacionistoj. Laŭ la unuaj tute ne ekzistas ia kontraŭeco inter la rezultoj de la pozitivaj sciencoj kaj la vulgara realismo; ĉiun diferencon aŭ kontraŭecon ili rekondukas al la propraj postuloj de ĉiu organo. La okulo ekz. vidas ĉiam nur unu flankon de ĉiu objekto; la orelo povas aŭdi nur certajn sonojn, k.t.p., sed tiuj propraj postuloj ne pruvas, ke efektive ne ekzistus la perceptitaj ecoj de la fizikaj objektoj; ankaŭ laŭkvanta atomkunmetiteco ne malebligas kvalitajn ecojn; kial ĉi-lastaj ne ekzistus?

Sendube, la Integral-realistoj laŭ mi pravas, asertante, ke la objektiveco de nia perorgana kono ne estas defendebla, se oni akceptas, ke niaj organoj nur virtuale objektive perceptas la fizikajn objektojn. Ĉi-kaze ja niaj organoj formale perceptas ion subjektivan, malgraŭ la fakto, ke la fizikaj realaĵoj (la atomoj, k.t.p.) vere kaŭzas tiun subjektivan impreson. Nia perorgana kono ne konsistus el bildoj similaj al la fizikaj realaĵoj, sed nur el efikoj, kiuj tute ne bezonas simili al siaj kaŭzoj. Niaj organoj do neniam povus konstati la propran naturon de la kaŭzoj (= fizikaj objektoj), kaj nia racio neniam kapablus koni la fizikan mondon laŭ ĝia vera ekzisto. Tiamaniere tamen ĉiu scienca laboro iĝus senutila, eĉ nereala, kvankam tiu ĉi konkludo evidente kontraŭas la rezultojn ekz. de la pozitivaj sciencoj.

Ĝenerale la Interpretacionistoj ne sufiĉe konsideras la konsekvencojn de la materieco de nia perorgana kono. Niaj organoj mem, kiel ĉiuj fizikaj objektoj, estas submetitaj al ĉiuj fizikaj leĝoj. Niaj okuloj ekz. vidas nur kolorojn, sed per la koloroj ni vidas ankaŭ objektojn, kaj per la kontrasto de lumo kaj mallumo ni ankaŭ perceptas distancojn, ĉar nia racio povas konkludi tion baze de nia sperto kaj niaj perceptoj.

[2]) Virtuale = nur en ĝermo; kiel kaŭzo.
[3]) Objektive = *ekster* la perceptanto, en la perceptita objekto.
[4]) Subjektive = *en* la perceptanto (= la subjekto).



La modernaj pozitivaj sciencoj nerefuteble pruvis, ke la laŭloka moviĝo estas la unua moviĝo en la materio. La laŭkvanta kunmetiteco de la materio tamen ne malebligas kvalitajn ecojn, sed tiuj ĉi lastaj supozas la jaman ekziston de la laŭkvanta kunmetiteco de la materio; tiu ĉi vidmaniero tute konformas al la Nov-tomisma sistemo, precipe ĉar la amplekso (latine: *quantitas*), laŭ Nov-tomisma vidpunkto, estas la unua eco de la materio. Ĉiuj aliaj ecoj en la materio estas ricevataj laŭ la amplekso, laŭ la tomisma aksiomo: *„Quidquid recipitur, recipitur ad modum recipientis",* aŭ esperantlingve: „Kio estas ricevata, estas ricevata laŭ la propra naturo de la ricevanto".

Sendube, la Integral-realismo (aŭ la „vulgara" realismo) ne malpli kontaktas kun la modernaj pozitivaj sciencoj ol la Interpretacionismo malgraŭ la oftaj, sed malpravaj riproĉoj de la mokantaj „progresemuloj".

408.92 : 35.078.17 (469)

## ESPERANTO MALPERMESITA EN PORTUGALUJO

Laŭ oficiala informo el Portugalujo, en tiu lando laŭ dekreto de la Ministro de Internaj Aferoj de la 11-8-1948 ne estas permesataj iuj ajn aktivaĵoj aŭ presaĵoj esperantistaj, kaj laŭ la opinio de la Konsilantaro de la Eduka Agado, sankciita de la Subsekretario de la Ministerio de la Edukado, 21-10-1948, ne estas permesata la instruo de Esperanto en la lando .........

Komento estas superflua. Estu prudenta en viaj rilatoj kun portugalaj samideanoj; ne kaŭzu al ili malfacilaĵojn per okulfrapaj signoj de esperanteco sur viaj korespondaĵoj al tiu lando.

(048.6) ≔ 089.2

La Ĝenerala Kunveno de la **Nederlanda Societo Kemiista (Hago,** Lange Voorhout 5), en sia kunsido de 23-12-1949 en Amsterdam, akceptis mocion proponitan de kvindeko da membroj, en kiu ĝi petas la redakciojn de la du gazetoj de la Societo, *Recueil des Travaux Chimiques des Pays-Bas* kaj *Chemisch Weekblad* estonte *allasi Esperanton por resumoj.* Ĉar ankaŭ la Estraro kaj la Konsilantaro de Interkonsiliĝo de la Societo subtenis la aferon, oni rajtas atendi ke la redakcioj agos konforme al la deziro esprimita en la mocio.

Jen la rikolto post klopodado dum preskaŭ kvar jaroj. — W. P. R.

Aperis: 408.9 (079.5)

**Enketo pri internacia helplingvo,** de Pierre Bovet, direktoro de la Instituto por Eduk-Sciencoj en Ĝenevo 1948, laŭ peto de UEA eldonita en 1949 de Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm, Svedujo. Prezo 5 rpk.